



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 6 · Novembro/Decembro 1958

Revido en Nürnberg!

„Gis revido en Nürnberg“ — tio estis la adiaŭa saluto de cent esperantistoj fervojistaj en Fulda aŭtune 1957.

La jaro pasis — kaj do tie renkontis tiun jaron je la 11a kaj 12a de oktobro la duan fojon la esperantistoj fervojistaj el Germanio. Nürnberg, la historia urbo, de kiuj ekvastiĝis Esperanto kaj kie fondiĝis la unua Esperantogrupo, atendis ilin.

La Nürnbergaj kolegoj estis preparintaj la kunvenon modale. Al ĉiuj partoprenantoj ili volis peri du belajn tagojn en samideana rondo. Necesis do preparoli en komuna laboro la zorgojn kaj malfacilaĵojn de nia movado, konstati ĝian evoluon kaj antaŭenpuŝi ĝin, interŝanĝi travivaĵojn kaj progresojn kaj ankaŭ prezenti al ĉiuj kelkajn komunajn gajajn horojn en la konata Esperanto-kamaradeco.

Dume jam kunsidis la estraro, la ceteraj partoprenantoj alvenis la antaŭtagmezon de la 11a de oktobro. Granda aŭŝo en la stacidoma halo atentigis la alvenintojn pri la akceptejoj, kie ĉiu ricevis siajn loĝejon kaj programon. Posttagmeze je la 15a horo denove kunsidis la estraro kune kun la subsekcioj. Oni konsilis pri urĝaj organizaj demandoj kaj laboro en la grupoj. La aliaj partoprenintoj — ĉirkaŭ 70 estis anoncintaj sin — intertempe alrigardis de fakulo gvidataj la vidindaĵojn de la trafikmuzeo. Je la 18a horo ĉiuj la unuan fojon kunvenis al filmprezentado, kie Esperanto-Filmo-Germanujo montris filmon pri Braunschweig kaj la Harz-montaro kaj sian novan kreaĵon pri la 43a UK en Mainz. Ĉi tie ĉiuj, kiuj ne havis la feliĉon ĉeesti en Mainz, en konciza sed bone verkita formo povis travivi la plej gravajn okazintaĵojn de tiu unika festo de pli ol 2000 homoj el 40 landoj parolantaj la saman lingvon. Eĉ sondisko havanta 5 popol-kantojn en Esperanto estis ludata kaj trovis ĉies aprobon. Pli ol 100 ĉeestantoj plenigis la iom tro malgrandan ejon. Post komuna vespermanĝado en la gastejo „Zum Karthäuser-tor“ la partoprenintoj denove renkontis sed ĉifoje en la festsalono de la trafikmuzeo al festvespero. Kamaradece kaj senprofiite estis disponiĝinta la ĉambro-orkestro de AW Nürnberg gvidata de s-ro Rahn per bonega muzika programo por la solena aranĝo de la vespero. Fervoiistoj muzikis por fervojistoj ĝojante Testi ĝojigantaj, ĉar la alporolojn esperante parolitajn la muzikistoj verŝajne ne komprenis. Des pli valoras ilia kunago, kiun rekompensis la pli ol 100 partoprenintoj per tutkora aplaŭdado.

La festparoladon faris la prezidanto de la germanaj esperantistoj fervojistaj, kolego Giessner. Salutojn kaj bondezirojn al plua prospero transdonis nome de la Germana Esperanto-Asocio ĝia Sekretario s-ro Deübler. Eĉ saluttelegramoj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj el eksterlando alvenis. La solena vespero finiĝis per la komune kantata himno „La Espero“. Krom la germanaj esperantistoj fervojistaj partoprenis ankaŭ 2 gastoj el Francio kaj Nederlando. La solena aranĝaĵo, kiun la Nürnbergaj kolegoj estis formintaj kun tiom da amo, estus estinta inda de pli granda nombro da

vizitantoj, sed la vojo al Nürnberg por multaj estas tre longa kaj postulas de ĉiu ankaŭ oferon je mono kaj tempo. Kiu deziris konatiĝi ankaŭ kun Nürnberg noktmeza, vizitis kune kun aliaj kolegoj aligite unu el la ŝatataj gastejoj por amika trinkado.

La dimanĉa antaŭtagmezo ree estis dediĉata al komuna laboro. La partoprenintoj renkontis en la ĉambrego de la kantino vagonŝanĝeja. Post klarigoj de estraranoj pri la laboro farita en la pasinta jaro oni praktike demonstris lecionon, por peri al ili ekzemplon imitindan por la gruplaboro. Guste tiun lecionon ĉiuj entuziasme akceptis. Por lerni la bonan elparolon esperantan estis prezentata sondisko, kiu estas taŭga helpilo al grupoj havantaj sondiskan aparaton. Ankaŭ la estro de la socialorganiza distrikto Nürnberg, BOI Kavalo, bonvenigis la kunvenintojn kaj faris al siaj gastejoj ĉiun nur eblan helpon. Post komuna tagmanĝo jam ree venis la tempo por adiaŭi. Bedaŭrinde la planita posttagmeza urbvizito pro konstanta pluvo ne povis okazi. Kelkiu do uzis pli fruan trajnon por veturi hejmen. Tamen ĉiuj partoprenintoj denove gajnis la konvinkon, ke ĉiujara kunveno de ĉiuj germanaj esperantistoj fervojistaj urĝe necesas. Kiel venonta kunvenloko estis elektata Dortmund. Do al ĉiuj:

„Ĝis revido en Dortmund 1959!“

Steinig

Wiederseh'n in Nürnberg!

„Auf Wiederseh'n in Nürnberg“ — das war der Abschiedsgruß von hundert Eisenbahner-Esperantisten in Fulda im Herbst 1957. Das Jahr verging, und so trafen sich also dort in diesem Jahre am 11. und 12. Oktober zum zweitenmal die Eisenbahner-Esperantisten Deutschlands. Nürnberg, die historische Stadt, von der die Verbreitung des Esperanto seinen Ausgang nahm und wo die erste Esperantogruppe gegründet wurde, erwartete sie.

Die Nürnberger Kollegen hatten das Treffen vorbildlich vorbereitet. Allen Teilnehmern wollten sie zwei schöne Tage im Kreise Gleichgesinnter vermitteln. Galt es doch in gemeinsamer Arbeit die Sorgen und Nöte unserer Bewegung zu besprechen, ihre Entwicklung festzustellen und zu fördern, Erlebnisse und Fortschritte mitzuteilen und auch allen ein paar gemeinsame frohe Stunden in bekannter Esperantogemeinschaft zu bescheren.

Während bereits der Vorstand tagte, trafen die übrigen Teilnehmer im Laufe des Vormittags des 11. Oktobers ein. Ein großes Plakat im Vorraum des Bahnhofs machte die Ankommenden auf das Empfangszimmer aufmerksam, wo jeder seine Unterkunft und das Tagungsprogramm zugeteilt erhielt. Um 15.00 Uhr nachmittags tagte erneut der Vorstand zusammen mit den Unterabteilungsleitern. Es wurde über dringende Fragen der Organisation und Gruppenarbeit beraten. Die übrigen Teilnehmer — etwa 70 hatten sich vorgemeldet — besichtigten inzwischen unter fachkundiger Führung die Sehenswürdigkeiten des Verkehrsmuseums. Gegen 18 Uhr fanden sich erstmalig alle zu einer Filmvorführung zusammen, wo Esperanto-Filmo-Germanujo einen Film über Braunschweig und den Harz sowie ihre neueste Schöpfung über den 43. UK in Mainz vorführte. Hier konnten alle, die nicht das Glück hatten, in Mainz dabei zu sein, in gedrängter, aber gut gefaßter Form die wichtigsten Ereignisse dieser einzigartigen Kundgebung von über 2000 Menschen mit gemeinsamer Sprache aus 40 Ländern miterleben. Auch eine Schallplatte mit 5 Volksliedern in Esperanto wurde vorgespielt und fand guten Beifall und Absatz. Über 100 Anwesende füllten den etwas zu kleinen Vorführraum. Nach gemeinsamem Abendbrot im Gasthaus „Zum Karthäusertor“ trafen sich die Teilnehmer erneut, aber diesmal im Festsaal des Verkehrsmuseums, zu einem Festabend. In kameradschaftlicher Weise hatte sich das Kammerorchester des AW Nürnberg unter Leitung von Herrn Rahn mit einem ausgewählten Programm zur festlichen Gestaltung des Abends uneigennützig zur Verfügung gestellt. Eisenbahner spielten für Eisenbahner aus Freude an gemeinsamer Freude, denn von den folgenden in Esperanto gehaltenen Ansprachen dürften die „musici“ nur wenig verstanden haben. Um so höher ist ihre Mitwirkung zu werten, die durch herzlichen Applaus der über 100 Teilnehmer belohnt wurde. Die Festrede hielt der Präsident der Deutschen Eisenbahner-Esperantisten, Kollege Giessner. Grüße und beste Wünsche für gutes Gelingen überbrachte für den Deutschen Esperantobund ihr Sekretär, Herr Deubler. Auch Glückwunschtelegramme des Int. Eisenbahner-Esperantobundes und aus dem Ausland waren eingegangen. Der feierliche Abend klang aus in der gemeinsam gesungenen Hymne „La Espero“. Außer den deutschen Eisenbahner-Esperantisten nahmen auch 2 Gäste aus Frankreich und Holland teil. Die würdige Feier, die die Nürnberger Kollegen mit so viel Liebe gestaltet hatten, wäre einer größeren Besucherzahl wert gewesen, aber der Weg nach Nürnberg ist für viele weit und verlangt von jedem einzelnen auch ein Opfer an Geld und Zeit. Wer Nürnberg noch bei Nacht kennenlernen wollte, besuchte anschließend mit Kollegen eine der beliebten Gaststätten zu geselligem Umtrunk.

Der Sonntagvormittag war wieder gemeinsamer Arbeit gewidmet. Die Teilnehmer trafen sich

im Saal der Kantine des Rangierbahnhofes. Nach Erklärungen des Vorstandes über die geleistete Arbeit im verflossenen Jahre wurde eine Unterrichtsstunde in Praxis durchexerziert, um den Teilnehmern Winke für ihre Gruppenarbeit zu Hause mitzugeben. Gerade diese Stunde wurde von allen dankbar aufgenommen. Zum Erlernen der guten Aussprache in Esperanto wurde eine Schallplatte vorgeführt, die für Gruppen mit Vorführgerät eine gute Hilfe ist. Auch der Leiter des Sozialwerkes Nürnberg, BOI Kavallo, hieß die Versammelten in seinem Bezirk herzlich willkommen und ließ seinen Gästen jede nur mögliche Unterstützung angedeihen. Nach gemeinsamem Mittagbrot hieß es schon wieder Abschied nehmen. Die für den Nachmittag vorgesehene Stadtbesichtigung mußte leider wegen Regens ausfallen. Mancher nahm daher nach Möglichkeit einen früheren Zug für die Heimreise, aber alle hatten erneut die Überzeugung gewonnen, daß eine jährliche Zusammenkunft aller deutschen Eisenbahner-Esperantisten dringend notwendig ist. Als nächster Tagungsort wurde Dortmund gewählt. Darum an alle:

„Auf Wiederseh'n in Dortmund 1959“

Steinig

Du trajnaranĝistoj modelaj

Preskaŭ ĉiu grupestro plendas pri la malgranda nombro da interesuloj, kiuj deziras lerni Esperanton. Rilate la fervojistojn oni ofte aŭdas kaj legas la evidente konvinkan klarigon: „Genas la neregula deĵoro“. Mi ne kredas tion, absolute ne.

Bonvolu aŭskulti jenan veran historion pri du fervojistoj, kiuj komencis lerni Esperanton.

Niaj samideanoj deĵoras kiel trajnaranĝistoj en mezgranda stacio. Memkompreneble ili estas devigataj labori dumtage kaj kelkfoje ankaŭ dum la nokto. Sed tamen — niaj komencantoj veturas ĉiusemajne duonan horon tien al la kunveno kaj post la instruado duonan horon reen. Tiamaniere okazas ekzemple, ke ili forlasas la kunvenon je la 18a horo kaj ĝisatendas ripozante 2 aŭ 3 horojn sur simpla kuŝilo la komenciĝo de sia noktdeĵoro; aŭ la deĵoro finiĝas je la 14a horo kaj ili restas en la atendejo ĝis estas tempo ekveturi, ĉar niaj amikoj ne loĝas en la deĵorloko, sed en malproksima vilaĝeto.

Ĉu vi ankoraŭ opinias, ke la „neregula deĵoro“ de la fervojistoj efektive baras la studadon de nia mondlingvo Esperanto? Ĉu ne ankaŭ vi konsentas, ke ofte nur mankas la bona volo kaj la ĝusta pensmaniero? Kaj — ĉu ne hontu kelkiu fervojista samideano leginte le raporton pri la Esperanton lernantaj trajnaranĝistoj? -flw-

Jahresbeitrag: Durch Erhöhung des Jahresbeitrages für IFEF auf 1,5 Gulden muß der Jahresbeitrag für GEFA für 1958 von DM 2,— auf DM 2,50 erhöht werden. La estraro

Diversaĵoj:

Pol. Fervojista Esperanto Federacio estas nove fondita en Varsovio. Ni salutas la polajn fak kolegojn esperantistajn tutkore kaj deziras al ili bonan progreson kaj evoluon.

Helpu multnombre al **Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda**. FERN intencas aranĝi 1959 ekspozicion de bildkartoj pri fervojaj stacidomoj tutmondaj. Pro tio FERN petas vian kunhelpon. Sendu do al J. J. Labordus, Kenaustrato 26, Utrecht, Nederlando, vian kontribuon bildkartan. Li anticipe dankas kore kaj sendos rekomende belan bildkarton el Nederlando al vi.

Senpage vi ricevos:

32paĝan bele ilustritan Esperanto-gvidilon de la famkonata urbo Ravenna. Ĝi enhavas multkolorajn bildojn de la artaj mozaikoj en la konstruaĵoj vidindaj de tiu urbo. Antaŭ ol vi vizitos ĝin, nepre mendu per bildkarto kun popolaj kostumoj kaj vestoj, kiujn la grupo kolektas por ekspozicio, la gvidlibron ĉe Esperanto-Grupo, Ravenna (Italio), P. Anita Garibaldi, 1.

22paĝan bele ilustritan Esperanto-gvidlibron de la pola ĉefurbo Varsovio, kiu estos la kongresurbo en la jaro 1959. La prospekto enhavas ankaŭ urbplanon kaj estas ricevebla en ĉiu „Pola Vojaĝoficejo Orbis“ en Germanio.

EL LA GRUPOJ:

Bremen: Vizitis la grupon iama Bremenano, kiu nun loĝas en Chikago. Si raportis pri la tiea Esperanto-movado kaj montris belajn kolorbildojn de la malnova kaj nova grandurbo usona. Tre impresis la unuarangaj fotoj kaj donis al la grupanoj kaj gastoj aperintaj superrigardon pri la supereco rilate al vivmaniero kaj vivstato en Ameriko.

Lübeck. La 2an de oktobro ni komencis novan kurson por komencantoj kun 12 partoprenantoj. Ni ĝojas pri ĉi-tiu sukceso. La plej juna komencanto (Heidi) estas 10jara. Nia kasisto s-ano Jakubeit bedaŭrinde nun forlasos nian grupon, por deĵori en Braunschweig. Ni dankas al li pro lia energia kunlaboro. La grupo nuntempe havas 25 membrojn.

Hermann
Essen: La lasta kunveno de la direkci-regiono Essen okazis la 23an de aŭgusto 1958 posttagmeze en la restoracio „Zur Börse“ en Dortmund. Krom la Dortmundaj kolegoj partoprenis kolegoj el Duisburg, Essen kaj Bottrop. Post la oficiala programo nia kolego Bartz (Dortmund) raportis pri la UEA-kongreso en Mainz kaj pri la vizito de bulgara fervojista esperantisto — kolego Petro Lilkov — en Dortmund. Kolego Bartz menciis, ke jam en la akceptejo en Mainz la ĉefurbestro — s-ano Franz Stein — kaj kolego Gießner (Braunschweig) bonvenigis la kolegojn. En Mainz li renkontis multajn geamikojn el diversaj landoj. Pri lia partopreno la gazeto „Westfälische Rundschau“ raportis kaj montris bildon faritan antaŭ la akceptejo en Mainz.

Post la kongreso bulgara kol. Petro Lilkov vizitis kolegon Bartz en lia hejmo. La 12an de aŭgusto postagmeze la ĉefurbestro de Dortmund — malnova s-ano Dietrich Keuning — gastigis la du kolegojn; ĉeestis ankaŭ s-ano Tadeusz Pleskaczynski el Polio kaj kolego Dickel el Dortmund. Ĉirkaŭ unu horon oni preparolis diversajn temojn en la deĵorĉambro de la ĉefurbestro. Kolego Dickel informis la

jurnalistojn de du eminentaj Dortmundaj gazetoj pri la renkontigo. Krom artikolojn la gazetoj enhavis bildojn pri tiu internacia rondo La aliajn tagojn la du kolegoj el Dortmund alterne akompanis la bulgaran kolegon en la vizito de kelkaj fabrikoj, de la eksterlando-instituto kaj de diversaj vidindaĵoj kiel Hohensyburg, Westfalenhalle, Reinoldi-preg-ejo, Sabena-flughaveno k. t. p. Bedaŭrinde ili ne rajtis viziti la riparejon Schwerte Ost, kiun viziti la bulgara kolego havis tre grandan intereson. — Lun vesperon esperantista rondo kun Petro Lilkov festis en la hejmo de kolego Bartz, kie oni i. a. aŭskultis la unuan Eperanto-sondiskon pri popolkantoj, en Germanio.

Post 4taga restado en Dortmund la bulgara kolego daŭrigis sian rondveturadon tra Braunschweig, Berlin, Dresden kaj Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrio, Hungario, Jugoslavio al Sofio; tiamaniere li trapasis 7 landojn, kaj en ĉiuj landoj li estis gasto de Esperantistoj.

Schnetzer

Wuppertal: En la tuta regiono direkcia ne ekzistas Esperanto-grupo.

Ankaŭ la subsekcio estas izolulo.

Por vigligi nian movadon, mi alvokis al Esperantokurso en la „Amtsblatt“.

Anoncis sin 11 fervojistaj kolegoj.

La kurso komenciĝis la 25an de aŭgusto. Sufice Esperanton sperta kamarado gvidas ĝin. La lecionoj okazas ĉiusemajne.

La BSW Wt finance subtenis nin per lernolibroj. La loka oficejo disponigis al ni instruejon. Ankaŭ nia loka konsilantaro energie subtenis niajn klopodojn.

Do ni povas esperi, en la venonta tempo prezenti novan grupon.

Bedaŭrinde ni ne havas kontakton kun la multaj fidelaj membroj en la granda distrikto. Post antaŭvidebla tempo ni esperas fondi pluajn grupojn en la direkcia distrikto.

W. Graß



GAJAJN FESTOTAGOJN je KRISTNASKO

kaj

TUTKORAJN BONDEZIROJN por 1959

al ĉiuj membroj kaj amikoj

La estraro

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, AUSBESSERUNGSWERK. Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu kaj duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto. Sendimo por manuskriptoj I, II, III, V, VII, IX, XI. Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn